

CERBE kaj KORE



**KULTURA SUPLEMENTO
AL BULTENO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO N-RO 95**

N-RO 2 (70), MARTO 2018

Enhavo

<i>Jubileo: Tradukita poezio el la rusa</i>	
Vladimir Visockij en tradukoj de Ludmila Novikova	3
Konstantin Balmont. Miaj bestoj en traduko de Klara Ilutoviĉ	8
<i>Originala poezio</i>	
Mikaelo Bronŝtejn. Novaj poemoj	9
Valentin Melnikov. Premiitaj verkoj	12
<i>Tradukita prozo</i>	
Alfred Hejdok. La teruro en stepo	
Tradukis Gennadij Ŝlepĉenko	15
<i>Historio kaj scienco</i>	
Nikolao Gudskov. La plej granda revolucio dum histyorio	18
<i>Humuro</i>	
Mikaelo Povorin. Vintro	27
Aleksandro Mitin. Ekvinokso	28
Mikaelo Bronŝtejn. Kanteto por ĥora kantado	28

Jubilee: Tradukita poezio



La 25-an de januaro 2018 en Rusio oni solene festis la 80-jariĝon de la poeto, bardo, teatra kaj kina aktoro Vladimir Visockij (1938-1980).

La 4-an de marto okazos la duonjubleo

de poetino-esperantistino Ludmila Novikova.

Por distingi tiujn du gravajn datrevenojn, ni malkovras la novan numeron de CkK per kelkaj freŝaj esperantigoj de kantoj kaj poemoj de Visockij fare de nia kara Lunjo.

Du tekstoj de kantoj el kinofilmo “Vertikalo” (1967) estas donitaj sen la rusa originalo, ĉar estas konataj de preskaŭ ĉiuj rusoj parkere. La aliaj poemoj, iom malpli konataj, estas akompanataj de la rusa originalo.



Vladimir Visockij

Ludmila Novikova

LA PINTO

Ĉi tie ne plato, alia klimat',
Lavangoj torentas kiel kaskad',
Kaj muĝas ŝtona falad' post ŝtona falad'.
Kaj eblas retir', de rok' ĉirkaŭir'
Sed nin puŝas supren la aspir'
Laŭ vojo, kiu similas al militpad'.

Sen tia ascend', sen la riskosent'
Ne estos plena pri si kontent',
Eĉ se malsupre kapteblas stel' de l' ĉiel':
Ne eblas trovi ekster montar'
Dum tuta longa vivobonfart'
Dekonon da mirindaĵoj samaj kaj bel'.

Nek flora buked', nek ina lament'...
Kaj ne similas al monument'
La ŝton', kie ekdormis unu el ni.
Kaj flagras per flam', Eterna flam'
Montpint', kiun li ne atingos jam,
La krono el smeralde brila glaci'.

Nu jes – onidir', sen ĉes' onidir',
Sed ne – ne estis vana martir'!
Pli bonas tiel ol pro katar' kaj drinkad'.
Alia kohort' anstataŭ komfort'
Denove alprenos riskon de mort',
Atingos tiun pinton el la smerald'!

Apikaj montflankoj... Ne gapu do nun!
Ĉi tie ne kredu vi je la fortun' –
En montoj fidindas ne ŝton', ne glaci', ne rokmur' –
Fidindas nur via propra manpar',
La man' de l' amiko kaj ekipilar'.
Do preĝu, ke estu plej firma ŝnur' de sekur'.

Ni hakas la ŝtupojn... Ne eblas reven'!
Kaj tremas genuoj pro streĉo de pen',
Kaj pretas el brusto elsalti al supro la kor'.
La mondo sur polmo – en sven' staras ni,
Ni mute feliĉas, sed kromas envi'
Al tiuj, por kiuj montpintoj ankoraŭ en for'.

ЛЮБЛЮ ТЕБЯ СЕЙЧАС... MI AMAS VIN EN NUN'...

Марине В.

Люблю тебя *сейчас*,
не тайно – напоказ, –
Не *после* и не *до* в лучах твоих сгораю;
Навзрыд или смеясь,
но я люблю *сейчас*,
А в прошлом – не хочу, а в будущем – не знаю.
В прошедшем – "я любил" –
печальнее могил,
Всё нежное во мне бескрылит и стреножит, –
Хотя поэт поэтов говорил:
"Я вас любил: любовь еще, быть может..."

Так говорят о брошенном, отцветшем,
И в этом жалость есть и снисходительность,
Как к свергнутому с трона королю,
Есть в этом сожаленье об ушедшем,
Стремление, где утеряна стремительность,
И как бы недоверье к "я люблю".

Люблю тебя *теперь* –
без пятен, без потерь.
Мой век стоит *сейчас* – я вен не пережужу!

*Во время, в продолжение, теперь –
Я прошлым не дышу и будущим не брежу.*

Приду и вброд, и вплавь
к тебе – хоть обезглавь! –
С цепями на ногах и с гирями по пуду, –
Ты только по ошибке не заставь,
Чтоб после "я люблю" добавил я и "буду".

Есть горечь в этом "буду", как ни странно,
Подделанная подпись, червоточина
И лаз для отступленья, про запас,
Бесцветный яд на самом дне стакана
И, словно настоящему пощечина, –
Сомненье в том, что "я люблю" – *сейчас*.

Смотрю французский сон
с обилием времен,
Где в будущем – не так, и в прошлом – по-другому.
К позорному столбу я пригвожден,
К барьеру вызван я – языковому.

Ах, разность в языках, –
не положение – крах!
Но выход мы вдвоём поищем и обрящем.
Люблю тебя и в сложных временах –
И в будущем, и в прошлом настоящем!..

1973

Al Marina V.

Mi amas vin en *nun*’,
malkaŝe, sen imun’ –
Ne *antaŭ* kaj ne *post* en *via flam’* mi krias;
Kun pluvo kaj kun sun’
mi amas vin en *nun*’,
En iso – mi ne volas, en oso – mi ne scias.
Pasea “amis mi” –
funebra melodi’,
Ĝi tenerecon mian dampas malagrable, –
Elversis kvankam la poeto-di’:
“Mi amis vin, sed mia am’ probable...”

En tio vidas mi kompatan degnon,
Kiel al homo, forgesita post forir’,
Al forvelkinta eksa belulin’,
Al reĝo, kiu perdis sian regnon;
En tio estas la aspir’ sen celinspir’
Kaj malfidemo al “mi amas vin”.

Mi amas vin en *nun* –
sen perdoj, sen lakun’.
Viv’ mia pasas *nun* – ne tranĉos mi vejnŝnuron!
Nuntempe, ĉi-momente, simple *nun* –
Ne tiras min pase’, ne logas min futuro.

Mi venos ĉu per vad’,
per naĝ’, per aviad’,
Kun ĉenoj pudaj sur la gamboj mi eklamos, –
Al vi mi venos sen mispromesad’,
Ke post “mi amas vin” mi diros “kaj vin amos”.

Amaras tiu “amos” malmorala –
Subskribo falsa, verma truo, trompa ag’,
Rampejo por forir’ kun oportun’,
Venen’ kaŝita sur la fund’ pokala, –
Kaj kvazaŭ vangofrapo por la nuna tag’,
Malfid’ al tio, ke “mi amas” – *nun*.

Mi france sonĝas plu
kun tempa superflu’
En svagoj de l’ futur’, de la pase’ distinga.
Al pilorio mi ligitas, hu!
Vokitas mi al bariero – lingva.

Ha, lingva diferenc’, –
mi statas en maldec’!
Sed ni duope venkos tiun diferencon.
Mi amas vin eĉ’ en kompleksa tens’ –
En la futur’ kaj la pase-prezenco!..

Traduko de Ludmila Novikova (2018)

В.Высоцкий. Бокал (Танго)

Так дымно, что в зеркале нет отраженья,
И даже напротив не видно лица,
И пары успели устать от круженья,
И всё-таки я допою до конца.

Припев:

Все нужные ноты давно сыграли.
Сгорело, погасло вино в бокале.
Минутный порыв говорить пропал...
Не лучше ль мне молча допить бокал?

Полгода не балует солнцем погода,
И души застыли под коркою льда,
И, видно, напрасно я жду ледохода...
И память не может закрыть холода.

V.Visockij. Pokalo (Tango)

Fumecas, ne vidas mi nin en speguloj,
Kaj eĉ vid-al-vidе ne vidas mi ŝin,
Laciĝis jam paroj de la dancemuloj,
Sed mi ne foriros sen kanti ĝis fin’.

Rf:

Jam venas muziko al sia fino.
Paliĝis en mia pokalo vino.
Kaj ĉesis de la parolstreb’ minut’...
Ĉu nun preferindas fintrink’ en mut’?

Dum jar’ ne dorlotas per suno vetero,
Sub krusto glacia frostiĝis l’ anim’,
Atendas degelon mi jam sen espero...
Sed mi ne foriros sen kanti ĝis fin’.

Припев:

Все нужные ноты давно сыграли.
Померкло, погасло вино в бокале.
Минутный порыв говорить... пропал.
Нет, лучше мне молча допить бокал!

Rf:

Jam venas muziko al sia fino.
Paliĝis en mia pokalo vino.
Kaj ĉesis de la parolstreb' minut'...
Jes, nun preferindas fintrink' en mut'!

В оркестре играют устало, сбиваясь.
Смыкается круг - не порвать мне кольца...
Спокойно! Мне лучше уйти, улыбаясь,
И всё-таки я допою до конца.

Orkestro laciĝis kaj ludas sen lerto.
Fermiĝas la ring' - ne disŝiros mi ĝin...
Trankvile! Pli decas forir' kun rideto,
Sed mi ne foriros sen kanti ĝis fin'.

Припев:

Все нужные ноты давно сыграли.
Сгорело, погасло вино в бокале.
Тускней равнодушный оскал зеркал...
Не лучше ль мне просто разбить бокал?..

Rf:

Jam venas muziko al sia fino.
Paliĝis en mia pokalo vino.
Senbrilas la flegma okul' de l' spegul'...
Ĉu eble frakasi l'pokalon ĝis nul'?

Traduko de Ludmila Novikova (2016)

KANTO PRI AMIKO

Se amik' kulpas pri implik',
Ĉu li estas bravul' aŭ nul',
Se ne eblas pri li kompren',
Ĉu fidindas, ĉu ne.

Risku tiri lin al montar'!
Supreniru kun li en par'!
Kun vi estu l' amik' en lig' -
Malaperos implik'.

Se li estas hero' ne tro,
Se sor-iro por li - devi',
Se li trenas sin mem kun trem',
Misa paŝ' - kaj reven'!

Do, kun vi ne bravul' - fremdul',
Pelu lin for de l' mont' sen vort',
La poltronon tremantan ĉar
Ne akceptas montar'.


Se amik' sen lament' kaj plend'
Paŝis spite al ted' sen ced',
Se minacis al vi forfal' -
Savis li en batal';

Se li iris kun vi sen kri',
Supre staris en eŭfori',
Vian fidon meritas li
Dum la viv' - ne malpli!

Traduko de Ludmila Novikova

Miaj bestoj

Konstantin Balmont



Por homamas' leono plej ŝatata
Ne estas mia, kvazaŭ nur hundeg'.
Ne, tigro, de l' paŝad' senbrue glata
Pli strangajn revojn vokas al la fleg'.



Ankaŭ volupta, kvazaŭ ŝtalfarita,
Simbol' de Bakĥo, lerta leopard',
La tuta, kiel brilgenie mita
Pralegendul' – sorĉisto, di' kaj bard'.



Ankoraŭ, certe, ŝatas mi panteron,
Kiam la best' rigardas antaŭ si
En ian sorĉe ekstervivan sferon,
Kiel ĉiele monstra Sfinksvizi'.





Se de sanktaj' azia aŭ afrika
Foriĝos mia revoharmoni',
En mia viv' banale etefika
Katinon deziranta nomu mi.

Je la fajneco de miniaturo
Kunigis la tri bestojn ŝi en si.
Fajrerojn kaŝas ŝia felveluro,
La sang'-ebrion vagan en pasi'.



Laŭ ĉambroj paŝas ĉiam ĉiam ŝi senbrue
Al siaj rev', deziro aŭ kapric',
Subite enamiĝas mensoskue,
Mallumon, magojn serĉas en delic'.

En la pupiloj – revo ekzotika,
Fosfor' kaj rondoj de enigma ter'.
Edgar terura Baudelaire tragika
Sorĉitaj estis de l' katinmister'!



Du geniuloj en la revaj veroj,
Du miaj fratoj en ĥaos' de l' mond' –
Kun la senronda maro de suferoj
Kaj la senfina vivmuzika ond'!

Esperantigis Klara Ilutoviĉ

Originala poezio



Mikaelo Bronštejn

* * *

Ŝi brilis – ho jes! – kiel stel'
en mia senluma ekzisto.
Mi talpe eliĝis el tristo
sen penso pri vica botel'.

Min ravis la flama rigard',
plenplena je amaj radioj,
kaj ne plu min logis hodiaŭ
botel' kaj fetora cigar'.

Brakume en la butikeg'
ni vagis, gapante al prezoj,
kaj mi kun okuloj frenezaj
diradis al ŝi: – Tamen, ek!

Elektu nun laŭ via plaĉ',
dum ame batadas la koro,
parfumon de ajna odoro,
eĉ se por mi – nur odoraĉ'.

Elektu ŝuetojn kun rob',
ringeton, kolieron kaj pelton.
Mi amos vin – ĉarman kaj sveltan
ne lezos min mia miop'!

Elektis do ŝi sen skrupul',
sed mi per bankkarto platena
pagadis aĉetojn ĝis svena
konstato ke restis ja nul!

Nu... mia miopa gapad'
finiĝis kun fino de mono,
kaj stel' mia, eĉ sen pardono,
min lasis, fuĝinte laŭ pad'

apenaŭ ĉe lasta bretar',
kredindas, ke ie en kosmo.
Bedauris mi ja ne pri l'kosto,
pri skalo de l' sent' mia, ĉar

estingo forviŝis ŝin el
la koro kun milda tenero.
Mi pensis, ke ŝi estas stel',
sed ŝi estis sparko, fajrero...

10.08.2017

Al amiko

En la feliĉoj kaj plagoj
de l' forpasanta deksepa,
en disreviĝoj kaj venkoj,
en mia teda rutin'
pli kaj pli troas la pagoj
por diboĉado seksenta,
pli kaj pli ardas la ventoj
turmentegantaj nun min.

Aĝ', famili', malsanetoj,
prezoj, labor', politiko,
bruaĵaj najbaroj, vetero –
ĉio incitas en tut',
sed ne ekzistas malnetoj
de miaj tagoj, amiko,
do l' rememoroj, en vero
estas la ĉefa atut'

por vivi plu kaj aktivi,
legi kaj pensi, kaj verki,
ŝati la mondon kaj kanti
simplajn kantetojn el kor'.
Kaj enpensiĝas mi pri vi,
por rememorojn enverŝi
en mian nunon kaj frandi
l' guston de la rememor'

28.12.2017

* * *

Mi, profanece ekstereklezia,
eltrovas tamen la misteron en la
kutima mondo mia poezia,
mirinda belo de l' naturo subĉiela.
Se estus supre, en alia mondo,
io pli ĉarma, aŭ eĉ nur simila,
ĉi-tio, certe, estus la admon' do
por vivi plu, por iri plu trankvila.
En la anim' estante ne tro ruza,
honeste diru mi, ke ĉiam mi ne
rezignas tosti dum Kristnasko – ruse,
eŭrope, amerike kaj eĉ ĉine.
Kaj, dum senĉese pasas tempo kura,
ni levu glasojn en impet' kuntinta
por bona vivo en la mond' kultura –
jes, iom pli ol dum la jar' pasinta.

07.01.2018

* * *

En nia tumulta esto
ne ĉio dependas de ni,
sed eĉ se proksimas ĉes', do
ni iru por, eble, veni
al certaj atingoj, venkoj,
fervore kaj ne rutine.
Ĉu zorgos fortuna ben' kaj
apogo pri tio? Mi ne
tro kredas helpon eksteran,
tretante padeton mian,
sed se estas er' da ver' en
ekzist' de la sorto, ni en
padetoj niaj kutimaj
kuraĝu en nia nuno
kaj restu anime tiaj,
kiaj ni estis en junio.

20.01.2018

* * *

Mi ne sciis kien gvidas vojo vintra –
en la dens' arbara estis mi revinta
sub la blua blovo de l' ĉiela vento,
trans trankvilaj pinoj en la neĝa vesto
trovi nur aludon, aŭdi vokon foran
de l' fabelo, kiu tentas mian koron.
Kaj subite sentis la revanta sino
tenerplenan tuŝon de la malproksimo,
kaj kuraĝe iris mi, sekvante l'tenton
laŭ la vojo vintra.
Tamen – en printempon.

25.01.2018

Penseroj¹

Maljustas ĉio en la mondo, ĉar
okulojn havas mi nur du, ne kvar!
da haroj en la naz' mi havas milojn,
preferus anstataŭe mi flugilojn!
Neĝer-steletoj falas, ili diversas tre,
sed ĉiu ajn ses pintojn ja posedas.
Kaj tio eble pravas, ke Di' estas hebre',
eĉ kvankam je la Dio mi ne kredas...
Amik', ni ne diskutu pri metod':
por ĉiu estas propra vivprogramo.
Kaj se vi iun nomis "idiot'" –
ĉi tio ja ne estas epigramo.



Danĝeraj rimoj²

Birdetoj ĝoje grajnojn bekas,
kaj super ni flugante... kantas.
Ho, niaj streboj tiom vantas!
Ni homoj tiom multe pekas!
Mi, admirante herban verdon,
surpaŝis akcidente... kardon.
Necesas havi ja singardon,
por dum promen' ne riski perdon.
Tra teleskop' en kosma spaco
videbla estis ruĝa... luno.
Kaj ĝi al iuj ŝajnis puno,
de l' mondofino la minaco.
Fraŭlin', vidante luksan riĉon,
al la sinjor' prezentis... peton,
ke li donacu braceleton,
al ŝi farante la feliĉon.
Johan' kaj Manjo tre amikas,
kaj ili ofte kune... sidas:
Johan' trankvile televidas,

¹ Antaŭe aperis en loka bulteno "Esperantista Tribuno" (Razgrad, Bulgario) n-ro 1 (30) / 2016. 3a premio de la konkurso EKRA, 2016.

² 1a premio 2017 (humuro) de la konkurso EKRA, antaŭe ne publikigita.

kaj Manjo intertempe trikas.
Jen instruisto en lernejo,
la fizikist' – li estas... saĝa,
Ĉar kvankam estas li samaĝa
kun mi, li membras jam en TEJO.
Dum romantika aventuro
abunde gutis mia... ŝvito.
Ja mi ne estas emerito,
bonordas dume la naturo!

Evoluo³

en pratempo la homoj
estis analfabetaj,
poezio vivis
nur en kantoj kaj rerakontoj,
kaj por faciligi
memorfiksadon de poemoj
oni uzis rimojn.
rimoj estas ja

bonega memorfiksilo.

**Kaj se poemo trafas vere
Animon de la homo mem –
Eĉ post jardekoj do parkere
Resoni povos la poem'.**

Nun oni ne bezonas
ŝarĝi mensan memoron –
oni delonge havas paperon,
kaj lastatempe eĉ komputilojn,
do rimoj ne plu bezonatas.
almenaŭ oni diras tiel
aŭ eble oni simple pigras
kaj poiomete
perdas la kapablon rimi,
same kiel oni
ne plu kapablas kalkuli enmense –
ja ĉiu havas kalkulilon...
(cetere, kiom estas 15-oble 18?..)
Ni vivas pli oportune,
pli komforte
ol niaj prauloj,
tamen,
ĉu ni estas pli talentaj ol ili?
Ĉu pli feliĉaj?

³ "Evoluo" - 2a premio 2017 (poezio) en la konkurso EKRA, antaŭe ne publikigita

Ironiaj hajkoj⁴

facilas verki
hajkojn: nur la silabojn
kalkulu fingre.

sep fingrojn havis
inventinto de hajkoj
sur meza mano.

kvin, sep kaj kvin – pli
ol nombro de reguloj
en Esperanto.

jen mi sentema.
ĉu miaj sentoj ardas,
aŭ mankas temoj?

rusta verda stel’.
mi ne estas purigist’ –
esperantisto!

tra densa mallum’
briletas io stranga.
ĉu nova sento?

neniam lacas
diligenta kolegar’
babili vante.

poet’ sen popol’
kie konsolon trovos?
vane lamentas.

ĉu verki vane?
mi pensas trist-angore,
Johan-Valane.

“La bona lingvo”?
eternaj komencantoj
egale pigras.

⁴ ricevis laŭdan mencion en Belartaj Kkonkursoj de UEA 2016, presitaj antaŭe en “Belarta rikolto 2016”

penso rutina:
kiom ofte agacas
vivo behina!

ĉu esti aŭ ne? –
jen demand', kaj ceter' – nur
literaturo.

ho mia koro!
ĉu ni ne venkos fine?
diablo scias...

fino de l' ciklo.
do nun, kiu kapablas –
verku pli bone.

Tradukita prozo

Alfred Hejdok

Alfred Hejdok naskiĝis en 1892 en Latvio. Kiam li iĝis 16 jaraĝa li translokiĝis en Rusion. En 1914 li estis mobilizita en armeon. En 1917 en la germana fronto li iĝis militkaptito, sed post unu jaro liberiĝis.

Li revenis jam en revolucian Rusion, kaj tuj iĝis blankgardiano. En fino de la Civitana milito li devis rifuĝi en Ĉinion.


En Ĉinio Alfred Hejdok loĝis en Harbino, kie iĝis ĵurnalisto kaj verkisto. En 1929 li publikigis sian unuan rakonton en Harbina revuo "Rubej" ("Limo").

Tiam li fariĝis konstanta kunlaboranto de la revuo kaj aliaj Harbinaj ĵurnaloj. Pro japana milita reĝimo en 1940 li devis kun sia familio translokiĝi en Ŝanhajon.

Tie li estris sektion de beletristoj. En 1947 li kun sia familio revenis en Sovetunion.

Sed en 1950 li estis arestita, kaj dum ses jaroj vivis en diversaj koncentrejoj. En 1956 li estis liberigita kaj plene rerajtigita.

En la sama jaro li translokiĝis en Kazahion, kie laboris en scienc-esplosa instituto kiel tradukisto de la angla lingvo. En 1981 li iĝis pensiulo kaj denove translokiĝis en Altajan regionon, kie mortis en 1990.



La teruro en stepo

Bagrov kurbiĝis, kaj kun la kunpremitaj dentoj falis sur teron de polvokovrita stepo: iri plu mankis fortoj.

– Trinki...almenaŭ unu gluton da akvo... – Per malklara rigardo li adiaŭis grupeton de mizeraspektaj geviroj, fuĝantaj el Rusio, kiu freneziĝis pro civitana milito, kaj kun kiuj li vagis tra Mongolio.

Ili sombre paŝis, per la piedoj levante nubetojn de polvo.

Neniu el ili retrorigardis la falinton, ŝajnigante, ke ili rimarkis nenion. Sed Bagrov povus ĵuri, ke ili vidis ĉion, eĉ pli – ili atendis la matenon, dum ili trairis rusan ŝtatlimon, kie li ricevis donacon de patrolando – kuglon en la dorson.

Nun ili iras, penante trompi sin, por malfortigi voĉon de la konscienco.

Sed ĉu ili ne pravas? Edzoj devis savi siajn edzinojn, kaj patrinoj – infanojn!

Ja ili ne povas sur la brakoj porti lin, kiam morto sekvas ilin laŭpaŝe.

Pri tio, ke la morto proksimiĝas, ili ekkonis dank'al mongolo, kiu preterrajdis antaŭ duonhoro.

La mongolo ne posedis la rusan lingvon. Li levis unu manon kun disstarigitaj kvin fingroj, ka la alian kun la fleksitaj kvar, kio signifis ses. Poste li per la montrofingro desegnis kvinpintan stelon sur la frunto, kaj per la brako svinge montris ĉeeston de fusiloj.

Ses armitaj ruĝarmeanoj persekutis la fuĝintojn.

La fuĝintoj akcelis siajn paŝojn por foriri de la danĝero, kaŝi sin ie, kaj nokte, se estos ŝanco, atingi puton.

Bagrov levetis la kapon por ankoraŭfoje per la rigardo sekvi la forirantojn, ja ankaŭ espero por vivi foriris kune kun ili. Sed li volis vivi almenaŭ por ankoraŭfoje trinki malvarman kristale puran akvon.

Subite inter la forirantoj unu persono haltis kaj decideme ekpaŝis reen al Bagrov.

Li estas Viktoro... Amiko de la infaneco.

Post kelkaj minutoj Viktoro kun la rigida vizaĝo klinas sin super li.

Andreo! – lia voĉo tremas. – Ne malestimu min! Se ne mia bebo Lalka... edzino... mi ne lasus vin!

Bagrov kun malfacilo faris rideton:

Vian manon, amiko! Dankon... Iru al viaj proksimuloj, kaj faru por ili ĉion, kio eblas. Anstataŭ mi kisu Lalka-n... Iru, mi krucosignos vin!

Bagrov krucosignas la nervozan vizaĝon de Viktoro, kiu ploras.

– Mi... mi atingos unuajn jurtojn, kaj akiros por vi ĉevalon, se... se – Viktoro tuj senespere direktas sian rigardon al flanko, de kie devas aliri morto.

Li konvulsie ekploreĝis kaj, returnante sin, forkuris por atingi la forirantojn.

Ĉiuj foriris... Akvon!

Tie, fore, sur rusa tero situis ligna dometo. En ombro de verda ĝardeneto troviĝis eta silo, de kie patrino en somera vespero ĉiam elportis al filo grandan blankan kruĉon kun ŝaŭma kvaso, en kiu floris ŝvelaj rosinoj.

Necesas vivi almenaŭ por ankoraŭfoje sattrinki freŝan, kristale puran akvon!

Ĉu provi atingi tiun helmeton, kaj post ĝi kaŝi sin for de la persekutantoj?

Li stariĝas sur la piedoj, ekkrias pro doloro, falas kaj denove stariĝas por iri. Post unu horo de neimageblaj penoj li troviĝas sur la helmeto. De tie oni bone vidas ĉion en malproksimo. Jam vesperiĝis, sed oni povas rimarki iajn nigrajn punktojn en

foro, ĝuste ses punktojn. Bagrov kaŝas sin en kaveto, kaj petas la Dion sendi malluman, senlunan nokton.

Post duonhoro la hela luno lumigas la tutan stepon, kaj estas danĝere levi la kapon: la persekutantoj rimarkos. Tio estas timo! Li kubute apogas sin, kaj rigardas ĉirkaŭen.

La rajdantoj jam proksimas, sed en kontraŭa flanko, kien foriris la fuĝintoj, strange moviĝas terpeco de la stepo. Kio estas tio? Verŝajne komenciĝis deliro... Ne, tio estas lupoj, ĉirkaŭ cent lupoj, kaj gvidas tiujn silenta rajdanto, vestita per kamparana kaftano. La lupoj moviĝas kiel fluego... Jen la fluego transiĝas trans lastan holmeton, kaj trafas valon... De alia flanko alveturas ses rajdantoj. Nun ili malsupreniros al la valo... Ne, ili haltis, rimarkinte la luparon. En tiu momento el la valo la silenta gvidanto etendas la brakon antaŭen, kaj laringa, raŭka krio plenigas la valon.

Inferaj sonoj: hurlado, furioza bojado kaj feroca graŭlado eksonis responde al la krio. Tuj la luparo lavange ekkuregis antaŭen, al la rajdantoj.

Du-tri hastaj pafoj, kaj longa hurlo de morte vundita besto; la nigraj ombroj suprenjetis kaj grapole pendiĝis sur la ĉevaloj kaj rajdantoj. La ĉevaloj baŭmis kaj falis sur teron kune kun rajdantoj, kiujn kiel per malluma tego kovris la furioza bestaro, kun grinco disŝiranta tremantajn karnojn.

Teruro regis en la valo, kaj la freneziĝinta Bagrov fermis la okulojn, kaj ŝtopis la orelojn...

Dum longa tempo li kuŝis, sed kiam li malfermis la okulojn, li ekvidis kaŭrantan oldulon kun la grizhara barbeto kaj malbrilaj okuloj. Nenion esprimis lia ŝtonaspekta vizaĝo, kvazaŭ ĉiuj sentoj mortis en la homo.

La oldulo silentis, ankaŭ silentis Bagrov.

Subite la oldulo faris profundan spiron. Li kvazaŭ rekonsciiĝis kaj ekrigardis al la okuloj de Bagrov. Mallaŭte, kvazaŭ timante veki iun, li neklare eldiris:

– Ĉu vi kapablas rajdi?

– Sed la lupoj? – ekflustris Bagrov, klakante per la dentoj, preskaŭ paralizita pro la teruro.

– La lupoj forestas. Tiuj estas miaj hundoj, – ankaŭ mallaŭte respondis la oldulo.

–Ho, Dio! Kie vi akiris tiom da hundoj?

–Estis pli multe. Ili estas gardohundoj! – iom post iom vigle ekparolis la oldulo.

– Antaŭe la hundoj gardis miajn ĉevalarojn. Mi havis multajn ĉevalarojn ĉi tie kaj en Transbajkalio. Miaj filoj pelis tiujn en urbojn por vendi. Nun forestas miaj ĉevalaroj kaj filoj! .. Oni forprenis la ĉevalarojn, sed resendis nur la hundojn kaj paŝtistojn. Oni forprenis miajn filojn, sed ne resendis tiujn!

Voĉo de la oldulo eksonis, prononcante la vortojn. Nehoman kruelecon kaj aflikton oni sentis en la persono, kiu rezignis ĉion, krom venĝo.

En la valo aŭdiĝis sono de disronĝado de ostoj.

La oldulo kun moko kaj malico mallaŭte ekridis.

– Jen ekde tiam mi nutras la hundojn... vidu kiel ili krakmaĉas, kvazaŭ ronĝas sukeron!

Revuo "Rubej" №12, 1929



*Tradukis Gennadij Šlepčenko
(E-klubo "Pacifiko", Vladivostoko)*

La plej granda revolucio en la monda historio⁵

Nikolao Gudskov



Sciencaj revolucioj

Revolucio estas renverso, rompo de iu kontinua procezo, transiro de sistemo el unu stato al la tute alia. La plej unua asocio, kiun elvokas tiu vorto, estas politika revolucio, sed revolucioj okazas en ĉiuj sferoj de la homa agado. Sciencia revolucio estas plena aŭ tre grava ŝanĝo en imago pri la mondkonstruo (entute aŭ en la parto, interesa por konkreta grupo de sciencistoj), ŝanĝo de la mondkoncepto far certa socia grupo, kiun koncernas la scienco (en la moderna klera epoko – ofte la tutan socion).

Ĝenerale, la moderna historio de la sciencoj kutime rakontas pri kelkaj grandaj sciencaj revolucioj, kiam ŝanĝiĝis la manieroj por esploro kaj kompreno de la mondo: revolucio de la 17-a-18-a jc. (foje ties komencon oni konsideras eĉ de Koperniko!), de la fino de la 18-a-mezo de la 19-a jc., de la fino de la 19-a-mezzo de la 30-a jc., scienc-teknika revolucio de la dua duono de la 20-a jc. En tiuj periodoj vere draste ŝanĝiĝis karakteroj de la sciencaj konceptoj, sed la epokoj estas tre longaj por paroli pri vere drastaj revoluciaj ŝanĝoj; tial certaj sciencologoj parolas aŭ pri permanenta revolucia sciencia procezo (kiel Karl Popper), aŭ komprenas la nocion en la pure metafora senco.



Tute alian aliron proponis Thomas Kuhn (1922-1996) en la libro “La strukturo de sciencaj revolucioj” (*“The Structure of Scientific Revolutions”*) en 1962. Li, surbaze de konkretaj esploroj de evoluo de astronomio, fiziko kaj kemio, priskribis strukturon de la revoluciaj ŝanĝoj de ĝeneralaj imagoj en tiuj sciencoj, kio tre ekplaĉis al la sciencistoj. Li aplikis al sia analizo sociologian aliron, postulante, ke subjekto de la scienco estas ne apartaj

⁵ Tiu ĉi artikolo estis jam publikigita (sen ilustraĵoj) en *Sennacieca revuo* 2016-2017 (n-ro 144-145), pp. 7-12. Ni, tamen, decidis konatigi kun ĝi la rusian esperantistaron, kiu ne amase legada SR.

sciencistoj (kiom ajn geniaj ili estu), sed la scienca komunumo kiel tuta aro de tiuj, kiuj pri certa scienca kampo okupiĝas, kiu estas ligita per komunaj teorioj kaj metodoj, alproprigitaj dum studado kaj praktika scienca agado, aplikataj metodoj kaj interŝanĝo de la aplikataj rezultoj ĉefe en fakaj revuoj, ankaŭ konferencoj ks. La tuto de gvidaj teoriaj imagoj, komune kompreneblaj esplormetodoj, manieroj de interpretoj de la rezultoj ktp. nomiĝas ĉe Kuhn scienca *paradigmo*. Kiam la paradigmo ekzistas, kaj permesas bone, komune akcepteblaj, interpreti novajn rezultojn, klarigi diversajn fenomenojn kaj starigi novajn eslorendajn demandojn, la scienco evoluas *normale*, la rezultoj akumuliĝas kaj observeblas konstanta progreso. Tamen, povas okazi situacio, kiam la novaj rezultoj komencas ĉiam pli malkorespondi al la paradigmo, aperas neinterpreteblaj en ĝiaj kadroj fenomenoj. Kiam da tiaj faktoj estas malmulte, nenio grava okazas, oni povas ilin portempe neglekti. Sed kiam ili komencas komparebli kun la tradicie interpreteblaj, komenciĝas krizo de la normala scienco. Tiam oni provas ŝanĝi la paradigmon, inventadi novajn teoriojn, konstrui hipotezojn ĝis la momento, kiam formuliĝas tute nova teoria konstruaĵo, kiu permesas evoluigi la sciencan plu. Okazas *ŝanĝo de la paradigmo*, kio estas komplika kaj doloriga afero – ja ne unu persono, sed la tuta scienca komunumo (aŭ, almenaŭ, ties plimulto) devas ŝanĝi sian mondkoncepton. Do, tiu ŝanĝo (kaj nur ĝi!) estas scienca revolucio.

Antaŭ formiĝo de la normala scienco ekzistas periodo de aktiva konkurado de teoriaj premisoj de paradigmoj, finfine unu el ili akceptatas de la plimulto de interesitoj, kaj la scienco “startas”. Simila situacio povas okazi ankaŭ dum la scienca krizo, kondukanta al la revolucio. Dum funkciado de la paradigmo konkurado inter gravaj teoriaj, mondkonceptaj imagoj, ne okazas. De la psikologia vidpunkto, paradigmo estas *geŝtalto* de la komunumo, kaj ŝanĝo de la geŝtalto estas afero tre komplika.

Neniu aparta revolucia ideo, se ĝin ne akceptas la scienca komunumo (eĉ se post certa tempo ĝi evidentiĝas vera kaj fruktodona), naskas sciencan revolucion. Ekzemple, Georg Mendel estis geniulo, kaj rezultoj de liaj eksperimentoj pri hibridoj nun estas konsiderata bazo por la moderna genetiko. Sed en 1865, kiam li publikigis siajn rezultojn, preskaŭ neniu tiama biologo komprenis lian koncepton, kaj tute neniu akceptis! Nur post 35 jaroj, en 1900, la biologia komunumo maturiĝis por kompreni tiujn ideojn, kaj samtempe 3 sciencistoj en 3 diversaj landoj ripetis la rezultojn kaj interpretojn de Mendel (kaj “malkovris” lian malnovan verkon!). Do, la revolucio en la imagoj pri heredo ne okazis pro aparta geniulo Mendel, sed nur pro ŝanĝo de la ĝeneralaj imagoj far la biologia komunumo.


Do, laŭ Kuhn scienca revolucio okazas en certa scienca kampo, kie la paradigmo funkcias. Unuavice temas pri gravaj paradigmoj kaj revolucioj en biologio, kemio, fiziko ktp. ĝenerale, sed en ĉiu malpli vasta scienca branĉo ja ekzistas siaj propraj paradigmoj-mondkonceptoj kaj eblas propraj revolucioj. Krome, la scienco ne estas

tute izolita fenomeno de la homa vivo, kaj ŝanĝoj en la sciencaj imagoj povas foje ŝanĝi ankaŭ mondkonceptojn de la socio ĝenerale.

Lavango de novaj paradigmoj

Kaj nun mi volas atentigi pri certaj momentoj en la historio de la sciencoj, kiam en diversaj, tute malsamaj, iliaj branĉoj okazis revolucioj *samtempe*. Kaj inter tiuj eventoj mi volus noti ekskluzivan momenton tiaspecan: la jaro 1860±2-3 jaroj. Kio tiam okazis?


Unue, kaj plej grave – startis la biologia evoluteorio de Charles Darwin (Karolo Darvino, 1809-1882). 01.07.1858 estis prezentitaj mallongaj artikoloj de Darwin kaj Alfred Wallace pri origino de la specioj pere de la naturna selekto, kaj en 1859 publikigita la centra darvina verko “La origino de specioj” (“*On the Origin of Species by Means of Natural Selection, or the*



Preservati

on of Favoured Races in the Struggle for Life”).

La nova teorio aperis tre ĝustatempe, kaj ĝi estis ne nur rapide akceptita de la biologia komunumo, sed nereverseble ŝanĝis la tutan homaran mondkoncepton, en kiu la ideoj pri evoluo jam post deko da jaroj okupis dominan pozicion.



Due, kaj ligite – definitiva pruvo de malebleco de spontanea memĝermado de la vivo dank’al laboro far Louis Pasteur, publikigita en 1861-62. Sen ĝi

ne eblis plua disvolviĝo ne nur de mikrobiologio, sed ankaŭ de la biologia evoluteorio.



Trie, kaj ne malpli grave – definitiva formiĝo de la atom-molekula teorio en kemio, kiu estas ĝia ĉefa kaj centra paradigmo. Kvankam la teorio estis kreita jam de John Dalton en 1808, neklara situacio pri la ĉefaj nocioj en kemio ekzistis dum pli ol 50 jaroj, kaj la stato en tiu scienco similis la antaŭparadigman periodon ĝis la unua internacia Kongreso de kemiistoj, kunvokita en Karlsruhe en 1860. La Kongreson iniciatis la famaj kemiistoj Friedrich



August Kekulé, Charles Adolphe Würtz kaj Karl Weltzien, sed la ĉefan rolon ludis Stanislao Cannizzaro (Kanicaro), kiu plej klare formulis la ĉefajn kemiajn nociojn kaj konvinkis la plejparton de kemiistoj ilin akcepti. Kanicaro estis bona kemiisto, kiu faris signifajn malkovrojn (ĉiu studento-kemiisto konas *reakcion de Cannizzaro* pri disproporciigo de aldehidoj, ne havantaj hidrogenon en la α -pozicio rilate al la

karbonila grupo), sed por la historio li pli gravas kiel granda scienca revoluciulo, formulinto de la centra kemia paradigmo.


Preskaŭ samtempe, en 1861, aperas raporto de Aleksandr Butlerov pri kemia strukturo de la organikaj substancoj (*«Einiges über die chemische Structur der Körper»*), kiu fariĝis bazo de la paradigmo de la organika kemio.



Kvare, tiam estis finformulita la ĉelteorio – en la libro de Rudolf Virchow “Ĉelarpatologio” (*«Die Cellularpathologie in ihrer Begründung auf physiologische und pathologische Gewebslehre»*) en 1858. Kvankam la ĉelteorio disvolviĝis jam dum ĉirkaŭ 20 jaroj, la paradigman karakteron kun plena kompreno pri la deveno de ĉeloj nur pro ilia disdividiĝo ĝi akceptis ĝuste en tiu verko.

Kvine, en 1859 Gustav Robert

Kirchhoff formulis sian gravan leĝon pri radiado, kaj en 1860, kune kun Robert Wilhelm Bunsen, kreis la spektran analizon – gravegan metodon, kiu ne nur estas grava por kemia analizo, sed permesas difini la kemian konsiston de steloj kaj ceteraj astroj – la tasko, kiu ŝajnis antaŭ tio fundamente neatingebla.



Sese, ĝuste tiam aperas la unuaj artikoloj de Jamse Clerk Maxwell (Maksvelo) “Pri la fizikaj fortoĵoj” (“*On physical lines of force*”), publikigitaj en kelkaj partoj en 1861—1862, kiuj fariĝis bazo por elektrodinamiko. Tio ankoraŭ ne esis plene formulita nova paradigmo (ĝi plene kreiĝis post 3 jaroj), sed la starto okazis jam tiam.



Kion tio signifas? Evidentas, ke en biologio, kemio kaj fiziko formiĝis tre gravaj paradigmoj, en ĉefaj trajtoj validaj ĝis nun. Surbaze de ili ne nur funkcias koncernaj sciencoj, sed ili penetris en ĝeneralan mondpercepton de la mondo; ekde tiu tempo ili gravas por ĉiuj kleraj homoj. Oni povas nei pro, ekzemple, religiaj konsideroj evoluecion aŭ egalecon de sintezitaj substancoj al la naturaj, sed tio ne estas vere serioza konvinko (oni samtempe uzas rezultojn de biologia kaj kemia sciencoj, plene bazitaj sur tiuj teorioj, kaj ne sentas pro tio malkomforton). Tiuj paradigmoj ne nur ŝanĝis koncernajn sciencojn – ili nerenverseble ŝanĝis la mondon ĝenerale, homoj eĉ minimume klerigitaj jam vidis la mondon tute alimaniere ol antaŭ tio.




Samtempaj revoluciaj ŝanĝoj en la monda politiko

Do, treege gravaj sciencaj revolucioj okazis en malsamaj sciencoj samtempe en la jaroj ĉirkaŭ 1860. Sed ĉu ekster la scienca komunumo estis tiam iuj gravaj sociaj eventoj? Se ni atente rigardos, do jes.

Unue, tiam fine formiĝis la Brita Imperio en tiu aspekto, en kiu ĝi poste ekzistis dum preskaŭ cent jaroj: en 1957-58 okazis la sipaja ribelo en Hindio, post ĝia malvenko Britio oficiale ekregis Hindion kaj la reĝino Viktoria ricevis titolon “imperiistrino de Hindio”; en 1860 la britoj (kun francoj) konkeris Ĉinion en la 2-a opia milito kaj ricevis grandegan






ekonomian superecon en la lando. Brita ekonomio ricevis novan evoluimpulson.

Due, la 19-an de februaro 1861 la rusa imperiestro Aleksandro la 2-a subskribis la Manifeston pri abolo de la servuteco (laŭ projekto de Nikolaj Milutin), kiu esti la centra evento en la aro de pli-malpli paralelaj liberalaj reformoj en Rusio (sed ankaŭ paralelaj al kruela subpremo de naci-liberigaj ribeloj kaj koloniaj militoj en Pollando, Kaŭkazio kaj Meza Azio). En la lando komencis rapide disvolviĝi kapitalisma mastrumado.



Trie, en 1860 prezidento de Usono estis elektita Abraham Lincoln, pro kio en 1861 komenciĝis Usona enlanda milito. Venko en ĝi de Nordo fine kondukis al abolo de la sklaveco en la sudaj ŝtatoj kaj grava (sed ne lasta) paŝo al egalrajteco de ĉiuj homoj. En la tuta lando (kaj ne nur en ĝia Nordo) establiĝis la kapitalisma ordo.



Kvare, pro la popola milito en 1860-61 post revolucia milito gvide de Giuseppe Garibaldi unuiĝas la ŝtatoj de la Apenina duoninsulo kaj aperis la reĝlando Italio sub gvido de Vittorio Emanuele II. Formiĝis la itala nacio kaj la tutlanda libera merkato. (En la armeo de Garibaldi partoprenis la granda kemiisto Cannizzaro...)

Tiuj gravegaj mondpolitikaj eventoj signifis disvastiĝon de la kapitalisma sistemo al la tuta mondo, faris el ĝi ne iun lokan eŭropan, sed la tutmondan fenomenon, rapide evoluiĝantan en la posta epoko. De tiam tiu

ekonomia ordo ekregis rekte en la tutaj Eŭropo, Norda Ameriko kaj Aŭstralio, kaj nerekte, pere de la kolonia regado – en Azio kaj granda parto de Afriko; ĝis ĝia plena venko en la Suda Ameriko restis jam tre nelonge. Sekve, ŝanĝiĝis ankaŭ la politika bildo de la mondo – la venko de liberalaj valoroj en ekonomia vivo fariĝis memevidentaj, neceso kaj neeviteblo de la industria evoluo – la celo por ĉiuj. La homara pensmaniero en 1860-aj ne plu estis sama, kia en 1850-aj. Jes, ankaŭ pli frue okazadis grandegaj revoluciaj epokoj, kiuj influis samtempe plurajn landojn kaj pensmanierojn de ties loĝantoj (la Tridekjara milito, Napoleonaj militoj, revolucioj de 1848 ktp.), sed ĉiam temis ĉefe pri tuteŭropaj eventoj. En la limo inter 1850-aj kaj 1860-aj jaroj ektemis pri la vera tutmondiĝo. La ŝanĝo estis revolucia, kaj ni povas nomi ĝin la *tutmondiĝa kapitalisma revolucio*.




Nu, kaj signifoplena afero estas, ke la 15-an de decembro 1859 naskiĝis homo, kiu post kvaronjarcento provis doni la adekvatan respondon al la defio de tutmondiĝo...

Kompreneble, la sciencaj revolucioj kaj la tutmonda politik-ekonomia revolucia ŝanĝiĝo ne elvokis unu la alian. Sed ilia samtempeco, kun konsidero de la rolo de la politiko kaj ekonomio je la homa menso, permesas paroli pri la plej granda mensa revolucio, kiu ĝis nun okazis en la homa historio. (Eble ne hazarde estas, ke du el la ĉefaj ĝiaj protagonistoj – Darvino kaj Linkolno – naskiĝis smatage, la 12-an de februaro 1809) Krome, ascendo de la scienco sur la novan nivelon kune kun definitiva venko de kapitalismo en la tutmonda skalo elvokis eksplodon de la teknologia evoluo, nomiĝanta ofte la *dua industria revolucio*. Des pli strange estas, ke oni la revolucion de 1860, kiel tian, kutime ne rimarkas...

La sekva ĝenerala scienca revolucio

Ĉu la ĝenerala scienca revolucio en la jaroj ĉirkaŭ 1860, kiam la mondkonceptaj ŝanĝoj okazis samtempe en diversaj natursciencoj, estis unika? Evidente, ne: io simila okazis 40 jarojn poste en la jaroj ĉirkaŭ 1900. En tiu aserto estas nenio nova, ĉiu historiisto kaj epistemologo diras tion, ĝi estas tute triviala ekde la komenco. Sed oni parolas precipe pri la grandaj fizikaj malkovroj, lasante flanke aliajn natursciencojn kaj tiujn ŝanĝojn, kiuj okazis en ili. Sed se ni rigardos kune kun la fiziko ankaŭ kemion kaj biologion, ni vidos ankaŭ tie ŝanĝojn de paradigmoj, kaj, krome, evidentiĝas, ke (diference de la revolucioj de 1860) ili estas proksimaj *ideologie* – preskaŭ ili ĉiuj estas ligitaj kun establiĝo de atomismo (en la vasta senco de la vorto). Antaŭ tio atomismo estis la bazo por paradigmoj en kemio kaj molekula

fiziko, sed por ceteraj sciencistoj reala ekzisto de la diskretaj unuoj de la substancoj estis ne evidenta, kaj ili estis konsiderataj nur kiel oportuna abstraktaĵo.



Unue, antaŭ la komenco de la 20-a jc. okazis kelkaj malkovroj, kiuj preparis la revolucion en fiziko: X-radioj (1895, Wilhelm Conrad Röntgen), radioaktiveco (1896, Antoine Henri Becquerel), elektrono (1897, Joseph John Thomson), radiumo (1898, Pierre kaj Marie Curie). Fine, en 1900, esplorante la delonge konatan varmradiadon, Max Planck enkondukis la nocion kvantumo de energio, kies realecon pruvis en 1905 Albert

Einstein, klariginte helpe de ĝi la fotoelektran efikon. Malkovro de elektrono – atomo de elektro, kaj kvantumo – atomo – de lumo (poste nomita ankaŭ fotono) disvastigis la atomisman koncepton al tute novaj sferoj.



Due, la malkovroj de Albert Einstein (1905) kaj Jean Baptiste Perrin (1907) pri Braŭna moviĝo plene pruvis la realan ekziston de molekuloj kaj atomoj kaj permesis “pesi” la atomojn en realaj mezurunuoj. De tiu momento atomismo vastiĝis el specialaj kampoj al la ĝeneralscienca paradigmo kaj eĉ komunhomara mondkoncepto.



Hugo de Vries
(1848-1935)



Carl Correns
(1864-1933)



Erich von Tschermak
(1871-1962)


Trie, “remalkovro” far samtempe tri sciencistoj (Hugo de Vries, Carl Correns kaj Erich Tschermak-Seysenegg) en 1900 de la *leĝoj de Mendel* enkondukis nocion pri

kvantumoj-atomoj de la hereda substanco en biologion, kaj faris bazon por la paradigmo de la scienca genetiko.

Kvare, denove en 1905 aperis la unua skizo de la relativecteorio far – denove – Albert Einstein, kiu same fariĝis bazo por nova paradigmo en mekaniko – la sola el la epokfaraj tiutempaj teorioj, ne havantaj rektan rilaton al establiĝo de atomismo.

Al tio oni povas aldoni ankaŭ malkovron en 1901 de sangogrupoj (specoj de la sango, distingeblaj per la eblo aŭ neeblo de transfuzo inter du individuoj apartenantaj al malsamaj grupoj) far Karl Landsteiner – eĉ se tiu malkovro ne tuj estis aprezita kaj en sekvaj jaroj kelkfoje ripetita.

Finfine, kvankam tio ne rilatas al la sciencaj paradigmoj, sed jes ja, al la ĝeneralkulturaj, ĝuste



en 1900 aperis libro de Sigmund Freud “La interpreto de sonĝoj” (“*Die Traumdeutung*”) – la unua granda verko pri psikoanalizo, kies signifo por la homara menso kaj kulturo estis tre grava.



Ni povas vidi, ke la komunsienca revolucio de 1900 estis ne malpli vasta ol tiu de 1860, kaj ne redukteblas nur al la fiziko. Speciale notindas, ke la idea direkto de la ŝanĝoj estis la sama en tiom malsimilaj esplorkampoj, kiel radiado de energio kaj heredo!

Sed inter la du ĝeneralaj sciencaj revolucioj ekzistas, tamen, grava diferenco: la unuan akompanis samtempaj sociaj renversoj, kiuj ŝanĝis la tutan mondon, sed en 1900 kaj apudaj jaroj nenio aparte elstara en la mondo okazis: jes, estis militoj, ribeloj, politikaj bataloj kaj krizoj, sed ne de tro granda signifo. La vojoj de la homa intelekto kaj de ekonomio kaj politiko ĉi-foje ne estis paralelaj...



Vintro

Mikaelo Povorin

Vintro. Vendreda vespero. Viburno velkis. Vespertoj vanuis. Ventokirle vortica vetero! Virulentaj virusoj: vakcinu! Valizajn vojaĝantojn veturigas varmaj vagonoj. Vasta valo, vakaj vojoj, vepraj verstoj. Vilaĝaj vagabondoj viŝas vangojn. Varmaj vatitaj vestoj. Viskiaj varmboteloj. Veldistoj vidas vendejajn vitrinojn: vodkon!

Vjetnamio? Venezuelo? Vanuatuo? Vaŝingtono? Vatikano? Venecio? Vieno? Varsovio? Verŝajne Volgogrado (Voroneĵo, Vjazmo, Vladimiro, Vorkutao, Vladivostoko)⁶.

Vilao. Vidindaj vivkondiĉoj: vera Versajlo! Vestiblo, vestarko. Verando. Vitra varmizola vando. Virhundoj vostumas: vertago, vertrago. Vespermanĝo. Vakstolo. Vermiljona vazo: verbenoj, violoj, vicioj, vinkoj. Variaj varoj. Variantoj vegetaraj, viandaj: vermiĉelo, vinagro, vanilaj vafloj, vitaminaj vakcinioj, vinberoj, vermuto. Ventro volas vori! Vespitalia vangruĝa ventumila vidvino. Vid-al-vide veŝta viro verŝas valoran valencian vinon, venditan validvalute.

Venas vico de versaj verkoj. Volumo V: Vergilio, Verleno, Vjazemskij, Voloŝin, Vanŝenkin, Visockij, Viŝnevskij.⁷

Vindoza. Vigliga varietea videodisko. Virtualaj violonoj, vjoloj, violonĉeloj, vibrafonoj. Virtuozaj variacioj: Vivaldi, Vagnero, Vebero, Verdi, Villa-Lobos.⁸ Vokaloj vibrigas voĉkordojn: Verasi, Vopli Vidopljasova, Valeria, Vintaĵ, VIA Gra!⁹ Vulkano en vejnoj! Vezuvio!

Vila virkoko vertikale vertiĝe valsigas vualan virinon. Vulpe velura voĉo vartas, volupte varbas, vokas vican viktimon volonte veni viziti vaporbanejon. Varicela vizaĝaĉo. Verukoza vaksa verto. Varika ventregio. Vomiga vidaĵo!

Ve, vakero, vi vidas: verŝajne vanas via voko. Voto: vetoo! Venerea vibriono verŝajnas! Vervaj vortoj ne vekas Venuson, ne venkas virgon, vipuraj verboj ne venenas – vegetas, velkas, vanuas vakuen.

“Vulgarulo! Vandala vanta vampiro!! Vermoborita verda varano!!!”

Venas verga venĝa vangofrapo!

Vere vunda verdikto! Vodevilo vaporiĝas. Vivo-viveto!¹⁰ Vaterloo...

⁶ Volgogrado, Voroneĵo, Vjazmo, Vladimiro, Vorkutao, Vladivostoko – nomoj de rusiaj urboj.

⁷ Vergilio, Verleno, Vjazemskij, Voloŝin, Vanŝenkin, Visockij, Viŝnevskij – nomoj de diversnaciaj kaj diversepokaj verkistoj.

⁸ Vivaldi, Vagnero, Vebero, Verdi, Villa-Lobos – nomoj de klasikaj eŭropaj komponistoj.

⁹ Verasi, Vopli Vidopljasova, Valeria, Vintaĵ, VIA Gra – nomoj de sovetiaj kaj postsovetiaj kantistoj kaj muzikaj grupoj.

¹⁰ “Vivo-viveto” – latva kanto, kies esperanta traduko estas populara inter ekssovetiaj esperantistoj.

Ekvinokso

Aleksandro Mitin

1.

LA natur' priploras sunon,
*AŬ*skultante fridajn ventojn.
*TU*ŝas vangojn pluveretojn.
*NA*ŭza ombro rompos jam
*EK*vilibron en tagnokto.
*VIN*tr' akriĝas siajn dentojn.
OK monatojn longajn, tristajn
*SO*bros ni sen vin' de am'.



2.

*LA*ca land' denove revas
PRI Natura reviviĝo.
*TEM*pon plu konkeras lumo,
*PA*sis frid', pli brilas sun' .
*EK*kirliĝas jam, ekturbas,
VIN turnante ĝis vertiĝo.
OK semajnoj al somero —
*SO*rĉa temp' por kora jun' .

Kanteto por ĥora kantado

Mikaelo Bronŝtejn

Ĉi tiun frazon ruze uzas
mi ĉiam per recitativo:
Ĵaluza kuzo min akuzas
pro l' kazo de akuzativo.

Akuzo, kuzo, uzo, zo,
Akuzativo lezas tro.

CERBE kaj KORE

n-ro 2 (70), 2018

Kultura suplemento al Bulteno de REU (BdR) n-ro 95

BdR estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo
"RUSIA ESPERANTISTA UNIO"

**Oni rajtas uzi kaj represi ĉiujn materialojn de la eldono nur kondiĉe
de ĝusta indiko de la fonto**

CkK atendas viajn prozajn, poeziajn, interlingvistikajn, instru-
metodikajn kaj scienc-popularajn kontribuojn! Bonvolu sendi
ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru .

Estraro de Rusia Esperantista Unio

Redaktofino .03.03.2018